
# Inteligentaj salut-dialogoj

***Dialogo (1)***

## *Ĉu via edzino estas hejme?*

(Demandoj antaŭ pordo)



A: Saluton! Ĉu vi estas Ivano Stulteta?
B: Ne. Mi estas Petro Inteligenta.
A: Pardonu! Mi pensis, ke vi estas Ivano Stulteta.
B: Ne gravas!

********************************

A: Ĉu via edzino e s t a s h e j m e?
B: Ne. Mia edzino ne estas hejme.
A: Ĉu via filineto e s t a s h e j m e?
B: Ne.
A: Ĉu via f i l o – e s t a s hejme?
B: Ankaŭ li ne estas hejme.
A: Ne gravas. Ĉu via hundo e s t a s hejme?
B: Jes. Mia hundo – e s t a s hejme
A: Jen estas o s t o por via hundo!

***Dialogo (2)***

***En balo***



– Sa**lu**ton! Mi estas Jozefo Inteligenta.
– Sa**lu**ton! Mi estas Mar**i**a Ele**gan**ta.
– Tre a**gra**ble.

| Legu! | Skribu! | Traduku! |
|---|---|---|
| Mi estas Petro. | | |
| Pardonu! | | |
| hejme | | |
| Maria estas hejme. | | |
| Mi pensis. | | |
| Mi pensis, ke … | | |
| Mi pensis, ke Maria estas hejme. | | |
| Mi pensis, ke vi dormas. | | |
| Mi pensis, ke vi estas Ivano. | | |
| Mi pensis, ke vi<br>estas Ivano Stuleteta | | |
| edzino | | |
| mia edzino | | |
| mia filo | | |
| (mia) filineto | | |
| Mia edzino ne estas hejme. | | |
| osto | | |
| hundo | | |
| osto por hundo | | |
| via hundo | | |
| osto por via hundo | | |
| Jen estas osto por via hundo.<br>Jen – osto por via hundo. | | |
| agrable | | |
| tre agrable | | |
| estas tre agrable | | |
| En balo – estas tre agrable. | | |